# BACCALAURÉATS GÉNÉRAL ET TECHNOLOGIQUE

**SESSION 2016**

**ESPÉRANTO**

**SAMEDI 4 JUIN 2016**

# Examen blanc

Toutes séries générales et technologiques
Durée : 2 heures

**Le candidat traitera, dans la langue étrangère, l'ensemble des questions de l'épreuve pour laquelle il compose.**

*L'usage des calculatrices électroniques et du dictionnaire est interdit.*

Dès que ce sujet vous est remis, assurez-vous qu'il est complet.
Ce sujet comporte 3 pages numérotées de 1/3 à 3/3.

**Répartition des points**

| | |
|---|---|
| Compréhension de l'écrit | 10 points |
| Expression écrite | 10 points |

*En la januara* Ondo[1] *vi legis, ke Chuck Smith, 36-jara usona komputisto loĝanta en Berlino, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2015. Li afable konsentis respondi la demandojn de* La Ondo.
Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Kompreneble, mi ĝojis kaj estis tre honorita ricevi la titolon. Verdire, post la lanĉo de nia kurso ĉe Duolingo, mi surpriziĝis kiom da vere eminentaj esperantistoj, ekzemple, Dennis Keefe (fondinto de lingvaj festivaloj) kaj Evildea (la plej aktiva jutubisto), kvazaŭ kampanjis, ke mi ricevu ĝin. Mi tre feliĉas, ke mi povis plibonigi la vivojn de tiom multaj homoj tutmonde ĉefe per mia agado por Vikipedio kaj Duolingo. Same kiel Esperanto forigas lingvajn barojn, Interreto forigas distancajn barojn. Mi do tre kontentas esti parto de la nova cifereca revolucio ankaŭ por nia lingva komunumo. Rilate al tio, mi ĉiam diras, ke se oni volas kompreni, kion la homaro vere bezonos kaj volos, oni devas mem vivi en la estonteco. Tial mi ĉiam provas frue adapti novajn teknologiojn por kompreni kiel oni interagas kun ili. (...)

En 2011 mi iel trovis prelegon de Luis von Ahn pri lia nova projekto Duolingo kaj tuj vidis, ke ĝia potencialo similas al tiu de Vikipedio kaj eble eĉ superas ĝin! Do, mi tuj kontaktis Luis pri Esperanto kaj li respondis, ke ili planas aldoni kurson por Esperanto, sed simple tiam ne estis prioritato. Tion mi kompreneble povas kompreni… Esperanto ja estas sufiĉe malgranda lingvo kompare al multaj aliaj. Tamen mi tre surpriziĝis, kiam li komence de alia prelego diris, ke la plej petata lingvo por aldoni al Duolingo estas Esperanto, kaj li tute ne scias kion fari pri tio. Poste, aperis iuj enketoj, demandantaj kiujn lingvojn oni plej volis, ke Duolingo aldonu. En la unua enketo, la sveda venkis kaj jam en la dua kaj tria enketoj Esperanto venkis, do Duolingo kompreneble ne povis ignori tion! (...) Ne eblas scii, kiom eklernis, sed mi imagas, ke preskaŭ ĉiuj faris almenaŭ la unuan lecionon. Ĉirkaŭ 1000 homoj ĉiutage aliĝas al la kurso. Ĉirkaŭ 5000 aktive lernas la lingvon ĉiutage. Ni taksas[2], ke 30 homoj ĉiutage finas la kurson. (...) Ni fakte jam prilaboras E-kurson por hispanparolantoj! Nia nuna plano (kiu povas ŝanĝiĝi pro tutmondaj strategiaj kialoj) estas la jena sinsekvo post la hispana: la rusa, portugala, ĉina, franca, germana. Tiam ni analizos la merkatan postulon[3] kaj niajn rimedojn por vidi kiun lingvon ni sekve aldonu. (...)

Esperanto helpas konekti homojn tutmonde. Per ĝi, oni gajnas novajn amikojn kaj perspektivojn. Jen movado por tutmonda edukado. Tia edukado riĉigas multajn vivojn. Temas ne nur pri kelkaj homoj, sed nia agado per Vikipedio kaj Duolingo plibonigas la vivojn de centoj da miloj da homoj. Ĝuste ĉio ĉi motivas min daŭrigi mian agadon.

El la februara kajero de *La Ondo de Esperanto* (2016), rete http://sezonoj.ru/2016/01/smith-2

---

1 *La Ondo de Esperanto* estas internacia sendependa magazino en Esperanto.
2 Taksi: doni la valoron de
3 Postulo: bezono formulata de homoj

## I. COMPRÉHENSION DE L'ÉCRIT (10 points)

### A. COMPRÉHENSION

1. Danke al kiuj Esperanto-aktivuloj Chuck Smith fariĝis Esperantisto de la jaro?
2. Kie en Interreto kunlaboris Chuck Smith?
3. Kial unue Duolingo ne volis Esperanto-kurson?
4. Kial Duolingo finfine decidis aldoni Esperanton?
5. Al kiu Duolingo proponos estontece la Esperanto-kurson?

### B. TRADUCTION

Traduku al la franca la sekvan parton: de "Esperanto helpas konekti" (linio 27) ĝis "daŭrigi mian agadon" (linio 30).

## II. EXPRESSION ÉCRITE (10 points)

Traitez l'**un** des deux sujets. (entre 100 et 150 mots) :

1. Ĉu vi konas Vikipedion kaj Duolingon? Rakontu kiel vi uzas ilin kaj kion vi lernis per ili.
2. Reagu al la fino de la teksto: kion vi opinias pri utilo de Esperanto en Interreto?